Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, V

tradukita de Manfred Retzlaff

Bela loko de sufero,
Bela tombo estas vi.
Bela urbo, estas vero,
Ke adiaŭ diras mi.

Nun adiaŭ, promenejo,
Kie iris la knabin',
Nun adiaŭ, sankta ejo,
Kie mi ekvidis ŝin.

Se ne estus mi vidinta
Vin, de mia kor' reĝin'!
Ja ne estus okazinta,
Ke mizer' premegas min.

Ke vi amu min pasie
Mia estis ne dezir',
Mi nur volis vivi tie,
Kie blovas via spir'.

Vi amarajn vortojn diras,
Kaj min puŝas de mi for.
Tio tute min disŝiras,
Malsanegas mia kor'.

Kaj mi sentas egan lacon,
Min fortrenas kun baston',
Ĝis mi trovas mian pacon
Fore sub tombeja ŝton'.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, V" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1983-06-29.*

MR-136-1 / Arg-706-1420 (2012-12-07 10:00:57)